# Tagiĝo

MONATA INFORM-BULTENO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRASÍLIA

SCS - Ed. Goiás s/603 - tel:: 225-4761
Caixa Postal 04-0406
70000 - BRASÍLIA - DF - BRAZILO

OKTOBRO 1980

**PAPA BENO POR "ESPERO KATOLIKA"**



Kvankam, dum sia entuziasmiga vojaĝo tra Brazilo, la Papo ne havis okazon interparoli kun esperantistoj, tuj post lia reveno al Romo, li estis "kaptita" de niaj verdaj batalantoj dum aŭdienco rezervita al la diocezanoj de italaj urboj Rimini kaj Cesena, kie la Esperanto-movado estas bone organizita.

En tiu okazo, li benis la revuon "Espero Katolika" al li prezentita de la prezidanto de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, Pastro Duilio Magnani, kiu aperas sur la foto, tuj maldekstre de Papo Johano Paŭlo II. (Foto Heroldo de Esperanto)

**PLANO POR KURSOJ DE ESPERANTO DUM 1981**

Dum la venonta jaro la instruado de Esperanto en Brasília devus fariĝi kiel eble plej dinamika kaj kapilara. Iasence, ni devus starigi "Esperantistan MOBRAL" por ke ĉiu el ni, kiu kapablas legi kaj skribi en la Internacia Lingvo, instruu la aliajn! Paralele, estus oportune efektivigi planon de rapidaj kursoj de Esperanto por diversaj kategorioj de homoj kiuj estos en kontakto kun la kongresanoj de la 66-a UK. Aparta inform-agado en la lernejo estos ankaŭ dezirinda. Tiurilate, menciinda estas la iniciato de BAMEK (Barra Mansa Esperanto Klubo), kiu lanĉis konkurson en la lernejoj pri la temo "Esperanto - Lingvo Internacia". La konkurso, en portugala lingvo, celas plivastigi la informadon pri Esperanto inter la studentoj kaj instigi ilin lerni la lingvon. Ion similan ni devus aranĝi en Brasília kaj la alvoko estas direktita al niaj membroj, kiuj havas ideojn kaj sugestojn kaj pretas kunlabori en la kadro de nia Asocio.

**ĜOJIGA NOVAĴO POR LITERATUR-AMANTOJ**

"Ekzistas jam revuoj, cetere tre bonaj, almenaŭ parte literaturaj; tamen ŝajnas al ni, ke ĝuste la beletra literaturo ankoraŭ bezonas sian propran organon. Pro tiu nia opinio, ni havas la plezuron proponi al vi nian FONTON, kiu aperos ĉiumonate, kaj kiu celas doni al vi literaturan legaĵon originale verkitan kaj tradukitan."

Jen parto de la enkonkukaj vortoj per kiuj la prezidanto de la Esperanto Akademio, William Auld, prezentas la novan revuon eldonitan en Brazilo danke al senlaca kaj kompetenta agado de Gersi Alfredo Bays. La unua numero, 44 paĝoj, estas vere impona kaj meritas abonon. Ĉi-lasta sumas, por Brazilo, je la ekvivalento de 12 dolaroj (por 12 numeroj), pageblaj en kruzejroj per ĉeko aŭ poŝtmandato al "Gersi Alfredo Bays - Caixa Postal 49 - 89800 - Chapecó - SC"

o o o

## MEMBROJ DE UEA EN BRASÍLIA

Dum la jaro 1980, 25 esperantistoj de nia urbo fariĝis individuaj membroj de UEA kaj sekve, la Federacia Distrikto okupas la kvaran lokon en Brazilo, post la ŝtatoj de São Paulo, Rio de Janeiro kaj Minas Gerais.

Por 1981, sendube nia pozicio ankoraŭ pliboniĝos, ĉar multaj niaj membroj aliĝos al UEA okaze de la Universala Kongreso, Tiamaniere ili povos ricevi la monatan revuon "Esperanto", la Jarlibron, kaj esti detale informitaj pri kio okazas en la esperantista mondo. La aliĝojn ricevas la ĉefdeligito de UEA, Giuseppe Grattapaglia, en la sidejo de la Asocio aŭ rekte ĉe CAIXA POSTAL 04-0097 - 70000 BRASÍLIA - DF.

La kotiz-tabelo por 1981 estas jena:

| MEMBRO ABONANTO (revuo kaj Jarl.) | MEMBRO KUN JARLIBRO | ABONOJ Esperanto | REVUOJ Kontakto | ALDONA PAGO POR SOCIETO ZAMENHOF |
|---|---|---|---|---|
| Cr$ 1.300,00* | Cr$ 520,00* | Cr$ 780,00 | Cr$ 390,00 | Cr$ 2.600,00 |

* Gejunuloj ĝis inkluzive 25j. ricevas senpage la revuon "Kontakto".
La Societo Zamenhof plenumas la rolon de la iamaj "membroj subtenantoj".

## VIVO DE NIA ASOCIO

- Daŭras niaj semajnaj kunvenoj, ĉiusabate, en la sidejo de Edifício Goiás. Via partopreno estos ĉiam bonvena!
- Laŭ la tradicio, okazis komence de septembro kaj oktobro la festoj omaĝe al la membroj, kiuj havis naskiĝ-datrevenon en la koncernaj monatoj.
- La Loka Kongresa Komitato de la 66a UK estas redaktanta la Duan Bultenon kiu aperos je la fino de la jaro kun ĉiuj informoj pri ekskursoj, pri hoteloj kaj kun multaj detaloj pri la kongresaj aranĝoj. Granda atendo ekzistas en Eŭropo pri tiu bulteno por konkretigi la diversajn karavanojn de kongresanoj. Pri tiuj karavanoj aperos, antaŭvideble en oktobro, kompletaj informoj en la revuo "Esperanto" de UEA.
- Dum la Esperantista Rekontiĝo en Porto Alegre, fine de Septembro, nia Asocio estis reprezentita de S-ro Carlos A. Siqueira da Cunha. Al tiu rekontiĝo partoprenis cento da brazilaj kaj argentinaj esperantistoj.

### ESPERANTISTA RUBRIKO EN NOVA REVUO REVUO DE CIFRATER:

Urbo de Frateco - CIFRATER - Institucio por zorgado de orfaj infanoj en familiaj hejmoj, laŭ la spiritisma edukvidpunkto, ĵus lanĉis portugallingvan revuon por naciskala informado de siaj aktivecoj, kies nomo estas VOZ DA CIDADE DA FRATERNIDADE.

La revuo, 20 paĝa, simpla, kaj bone prezentita, havas rubrikon por disvastigo de Esperanto, unu el la celoj de la Institucio. En tiu rubriko oni intencas publikigi korespondkurson de Esperanto.

Helpo de la esperantistoj sub la formo de artikoloj, poeziaĵoj, korespondanoncoj, ktp, estos ĉiam bonvena.

La jarabono de VOZ DA CIDADE DA FRATERNIDADE, sumas je Cr$ 200,00, kaj estas farebla ĉe samiedeano JOSIAS BARBOZA, peranto de la revuo ĉe nia Asocio.

### NOVAĴOJ PRI BEJO

La gejunuloj estas petataj atendi "momenton" la aperon de pliaj numeroj de IMPULSO legante intertempe MOMENTON ! Ne temas pri vorto-ludo sed pri la nova primovada bulteno de BEJO, kiu aperas laŭbezone por kunligi la membrojn, kiuj nuntempe disas en 9 brazilaj ŝtatoj kaj eĉ en eksterlando.

Post la vasta eĥo de la unuaj kvar numeroj de IMPULSO estas deziro de ĉiuj, ke la eldonado de la revuo daŭru ankaŭ en 1981, ĉar la taskoj de la junularo, en la kadro de la 66-a UK, ne estos malgravaj. Kvankam la kongreso de TEJO okazos en Meksikio kaj ne en Brazilo, tamen multaj eŭropaj gejunuloj jam anoncis viziton al Brazilo, post Meksikio. Do, antaŭen ! ! !

*Vi Vi Vi Vi Vi Vi Vi Vi Vi Vi Vi Vi VI*

*Vi - malmultaj literoj*
*Ne ekzistas pli belaj*
*Sed tre gravaj eroj*
*Nek aliaj pli helaj*
*De via propra mi*
*Ol tiaj literoj - VI*

*Dedicita al Juny*

*Benedito Lopes Ferreira - CIFRATER - GO*

CARO ESPERANTISTA:

Você tem apenas uns poucos dias para inscrever-se no 66º Congresso Mundial de Esperanto, aproveitando ainda o período especial para os Latinoamericanos, <u>COM TAXAS MAIS REDUZIDAS</u>.

Dia 31 de dezembro é o ÚLTIMO DIA! NÃO PERCA esta oportunidade. Inscreva-se AGORA MESMO!

Após dezembro a taxa aumentará C O N S I D E R A V E L M E N T E !!!


Envie a quantia respectiva através de cheque ou vale postal ao tesoureiro, SR. CARLOS AUGUSTO SIQUEIRA DA CUNHA - CAIXA POSTAL 13-2088 - 70000 BRASÍLIA - DF - BRASIL. Preencha o <u>aliĝilo</u> abaixo e remeta-o ao Sr. tesoureiro.

<u>VEJA AQUI EM QUAL CATEGORIA VOCÊ VAI INSCREVER-SE:</u>

| CATEGORIA | GULDENOJ | CRUZEIROS * |
|---|---|---|
| 1. Não-membro da UEA | 125 | Cr$ 3.850,00 |
| 2. Membro individual da UEA com Jarlibro | 103 | Cr$ 3.200,00 |
| 3. Membro individual da UEA com revista ESPERANTO e Jarlibro | 70 | Cr$ 2.150,00 |
| 4. Esposa (o) do (a) congressista na categoria 1 | 88 | Cr$ 2.700.00 |
| 5. Esposa (o) do (a) congressista nas categorias 2 ou 3 | 72 | Cr$ 2.200,00 |
| 6. Jovem até 20 anos (inclusive) | 38 | Cr$ 1.200,00 |
| 7. Universitário até 30 anos (inclusive) | 63 | Cr$ 1.950,00 |
| 8. Pessoas cegas | 50 | Cr$ 1.550,00 |

Eis os Estados e os respectivos números de Esperantistas já inscritos: SÃO PAULO (59); RIO DE JANEIRO (55); RIO GRANDE DO SUL (21); DISTRITO FEDERAL (16); BAHIA (16); PARANÁ (11); MINAS GERAIS (09); PERNAMBUCO (07); GOIÁS (03); RIO GRANDE DO NORTE (03); SANTA CATARINA (02); PIAUÍ (01); SERGIPE (01) e CEARÁ (01).

* <u>VALOR EM CRUZEIRO CONFORME O CÂMBIO ATUAL</u>.


ALIĜILO BRAZILO
BRASILIA
Kongresnumero
Dato de ricevo
Por la administracio
66a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 1981 en Brazilio, Brazilo
...stanta adreso: Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando
...ĉekkonto de la Kongreso: n-ro 627337 (nederlanda), aŭ
...ko de la Kongreso: Amsterdam-Rotterdam Bank, Rotterdam, n-ro 42.69.01.444.
...aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj ...resitaj sur la dorsa flanko. Mi sendas ...pagon laŭ la apuda specifo al:
...er postmandato/poŝta ĝiro/banka ĝiro ...anka ĉeko*
...ne povas jam aliĝi pro pasportaj aŭ ...spagaj problemoj. Mi promesas ...j tuj post alveno en la kongresejo.

Kotizo (en kategorio ___) ...
Adepta Kaso ...
Mindada Kaso ...
Literatura Kaso ...
Adeptaj Gepatroj ...
Bankkostoj ...
(Libervolaj donacoj)
Entute ...

... Virino (forstreku la nevalidan)
... (familia aŭ ĉefa, por alfabeta ordigo) ...
... (kompleta) ...
...pleta poŝta adreso: nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo ĝuste lokita
...
... (en Esperanto) ...
...ĝdato (nur por studentoj, junuloj kaj infanoj) ...
... de edz(in)o, kiu jam aliĝis aŭ aliĝas samtempe (aparta aliĝilo) ...
...de tiu ĉi aliĝilo ___/___/___ Subskribo ...
...zo de la administracio

A-membreco: kotizo de ......... ricevita por la jaro .........
...firmo de la C.O.: Konfirmo de [illegible]:

| ...o ricevita | Konfirmilo sendita | Statistikita | 2a Bulteno sendita | Kongreslibro sendita |
|---|---|---|---|---|

...orstreku la nevalidajn. Pagante internacie per banko aŭ ĉeko, bv. aldoni 5 gld. pro la bankkostoj.

SE VOCÊ AINDA NÃO É MEMBRO DA UEA SERÁ MUITO MAIS VANTAJOSO APROVEITAR A OCASIÃO E FILIAR-SE AGORA À UEA E SE INSCREVER PARA O CONGRESSO NA CATEGORIA 3.

NESTE CASO VOCÊ PAGARÁ MENOS DO QUE INSCREVENDO-SE NA CATEGORIA 1.

COMO MEMBRO DA UEA VOCÊ RECEBERÁ MENSALMENTE O BELÍSSIMO E MAIS IMPORTANTE PERIÓDICO DO MUNDO ESPERANTISTA - A REVISTA "ESPERANTO" - ALÉM DO ANUÁRIO E O CATÁLOGO DA UEA.

ENVIE AO SR. TESOUREIRO A COTA DE MEMBRO DA UEA PARA 1981 (CR$ 1.300,00) MAIS O VALOR DA CATEGORIA 3 (CR$ 2.150,00) PARA ADESÃO AO CONGRESSO, NUM TOTAL DE CR$ 3.450,00.

OBSERVE QUE ESTE VALOR AINDA É MENOR DO QUE O DA CATEGORIA 1.

BRASILIA C.M.E.

— SUA PRESENÇA É INDISPENSÁVEL —

— CONTAMOS COM ELA —

| Kongreskotizoj en guldenoj, ĝis: Periodo: | 80.12.31 unua | 81.03.31 dua | 81.06.15 tria |
|---|---|---|---|
| 1. Kongresano ne membro individua de UEA | 125 | 171 | 186 |
| 2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro | 103 | 149 | 164 |
| 3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo | 70 | 116 | 131 |
| 4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1 | 88 | 120 | 130 |
| 5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3 | 72 | 104 | 115 |
| 6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara | 38 | 51 | 56 |
| 7. Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara | 63 | 86 | 93 |
| 8. Blindulo | 50 | 68 | 74 |

Post la 13a de julio 1981 aliĝoj ne plu estos akceptataj, kaj la aliĝontoj devos pagi surloke en la kongresejo, laŭ la koncerna tarifo de la tria periodo plus krompago 40 gld.

* Latinamerikanoj povas pagi la kotizon en sia nacia mono, laŭ kurzo en la dato de la monsendo, rekte al la LKK-kasisto: s-ro Carlos Augusto Siqueira da Cunha, Caixa Postal 13-2088, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo. La ĉi-supra kotiztabelo validas nur por latinamerikanoj.
* La kongreskotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn aŭ bankedon. Pri tiaj aferoj aperos informoj kaj mendiloj en la Dua Oficiala Bulteno, kiun aliĝintoj ricevos en februaro aŭ marto de la kongresa jaro. Frua aliĝo helpas la aliĝanton ĝustatempe fari siajn mendojn ĉe la Kongreso.
* Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de la pago. Aliĝilo estos traktita nur post ricevo de la kompleta pago.
* La kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto poste ne partoprenas la Kongreson. Pagante kongreskotizon por alia persono, oni tion antaŭvidu.
* Kongresaliĝo ne estas transdonebla al alia persono.
* Estas nepre malavantaĝe kotizi en kategorio 1 aŭ 2. Oni ricevas pli kontraŭ proksimume la sama pago se oni estas membro-abonanto de UEA.
* Kongresano en kategorio 1 (nemembro de UEA) ricevas la revuon "Esperanto" dum la tuta kalendara jaro, en kiu okazas la Kongreso.
* Kongresano en kategorio 2 aŭ 3 devas pagi la membrokotizon de UEA antaŭ aŭ samtempe kun la kongreskotizo. Sen tio la aliĝilo ne estos traktita.
* Kongresano en kategorio 6 devas indiki sian naskiĝdaton.
* Kongresano en kategorio 7 devas indiki sian naskiĝdaton kaj sendi kun sia aliĝilo oficialan ateston pri sia studenteco.
* Kongresano en kategorio 8 devas sendi kun la aliĝilo oficialan ateston pri blindeco de blindula organizaĵo aŭ kuracisto. Gvidanto de aliĝinta aŭ samtempe aliĝanta blindulo rajtas aliĝi senpage, sed ne ricevas la Kongresan Libron.
* Infano malpli ol 13-jara rajtas aliĝi senpage, se samtempe aliĝas almenaŭ unu el la gepatroj, sed ne ricevas la Kongresan Libron.
* Ĉiu aliĝanto devas plenigi apartan aliĝilon. Se oni ne havas aliĝilon, oni uzu fotokopion aŭ samformatan paperon. Skribu klare – tajpe aŭ preslitere.
* Sendu la aliĝilon kaj faru la pagon al la sama instanco, prefere al via landa kongresa peranto. Nur se en via lando mankas peranto, sendu la aliĝilon al la konstanta adreso en Rotterdam, pagante al unu el la kontoj indikitaj aliflanke.
* Personoj kun transpagaj aŭ pasportaj problemoj povas sendi la aliĝilon, sen samtempa pago, al la konstanta adreso en Rotterdam. Tiuj personoj ne estos rigardataj kiel jam aliĝintaj, sed ili havos la rajton aliĝi tuj post la alveno en la kongresejo, pagante tie la kotizon laŭ la tarifo de la unua periodo.